

# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ  
Jaro 47-a BRAZILU, JULIO AŬGUSTO SEPTEMBRO 2023 N-ro 191

“Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem.”  
Jesuo (Mt, 22:37-40).

“Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro.”  
Kardec. *La Evangelio laŭ Spiritismo*.  
Ĉap. 19, §7.

“Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian.”  
Zamenhof. *La Espero*.

## LORENZ KAJ LA UNIVERSALA KONGRESO



ĝojiga afero renkonti tiom da homoj, kiuj admiras kaj apogas la laboron de nia Eldonejo. Nia prelego okazis ĵaŭde (la 3-an de aŭgusto) en salono Grattapaglia, kiu portas la nomon de Giuseppe Grattapaglia, unu el la plej longjaraj kunlaborantoj de nia Eldonejo. En ĝi estis oficiale lanĉita, kiel kutime, la **Almanakon Lorenz 2023**. Dum nia aktivaĵo, Alvaro Motta prezentis kelkajn informojn pri la novaj eldonoj de Societo Lorenz, pri la aĉeto de nia nova sidejo kaj pri la longjara rilato inter Esperanto kaj Spiritismo. Lige kun la temo de la kongreso (“Enmigrado - kunfluo de homaj valoroj”), li ankaŭ prezentis kelkajn detalojn de la vivo de la patrono de nia eldonejo, Fancisko Valdomiro Lorenz, kiu vivis kiel rifuĝinto en Brazilo, forlasinte sian naskiĝlandon kiam li estis nur 21 jaraĝa. Paulo Sergio Viana faris tre belan kaj klaran prelegon pri «La homa migrado en la mondo - laŭ la Spiritisma Doktrino» pripensigante nin ĉiujn pri la sociaj kaj moralaj defioj de nuntempa migrado. Post la prelego, okazis disdonado de la Almanako al la ĉeestantoj. Ankaŭ menciindas, ke ni disdonis, eldonitan de nia Eldonejo, kelkajn ekzemplerojn de la libro “**A küldöttek**”

(“**La senditoj**” en la hungara) de Francisko Cándido Xavier, al hungaraj samideanoj. Dum nia partopreno en UK, ni same profitis por



porti kelkajn ekzemplerojn menditajn de la libroservo de UEA. Ni kore dankas al Tânia

**E**LDONEJO LORENZ denove ĉeestis en la Universala Kongreso, kiu ĉi foje okazis en Torino (Italio). Dum la Movada Foiro, kiu okazis sabate (29-a de julio), ni havis la eblecon kontakti kaj interparoli kun multaj homoj, kiuj interesiĝis pri Spiritismo kaj multaj, kiuj estas amikoj de nia Eldonejo. Ni same havis la eblecon sendi propramane la Almanakon Lorenz 2023 al kelkaj kunlaborantoj, kiuj ĉeestis la kongreson. Estis vera



Paixão, Joana Pimentel, Elizabeth Guimarães kaj Graça Thuller pro la transportado de tiuj gravaj libroj en siaj valizoj. Koran dankon al ĉiuj, kiuj ĉeestis nian prelegon kaj kiuj vizitis nian budon dum Movada Foiro. Ni esperas renkontiĝi denove en Arusho (Tanzanio).

Kunlaboris: Alvaro Motta



Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidas Dion. (Mateo, 5:6)



**L**A 8-A ĈAPITRO DE La Evangelio laŭ Spiritismo temas pri la pureco de la homaj koroj. Kaj ĝi komenciĝas per unu el la plej frapaj admonoj de Jesuo, en Lia Prediko sur la Monto: li asertas, ke nur al kore puraj homoj estos eble “vidi Dion”.

Sub la mildaj paroloj de la Majstro troviĝas sufiĉe severa alvoko, ĉar kiu inter ni, ordinaraj homoj sur nia planedo, povas konscie diri, ke li havas puran koron? Se juĝi prudente, eble tre malmultaj troviĝas jam en tia spirita stato. Ni ankoraŭ ne povas “vidi Dion”

(kurioza esprimo!), ĉar efektive niaj koroj estas *malpuraj*.

Nia spirito similas al niaj fizikaj hejmoj sur la Tero. Ni regule purigas nian domon per balailo, sapo kaj aliaj purigiloj. Ĝi tiam fariĝas bonodora, senpolva, agrabla loĝejo. Sed ni ne sukcesas konservi ĝin konstante pura. Baldaŭ akumuliĝas pliaj polvo, rubaĵoj kaj aliaj malpuraĵoj, kio devigas nin denove preni la balailon...

Ni klopodas purigi nian animon en simila maniero: ni preĝas, ni petas helpon de bonaj Spiritoj, ni legas la Evangelion, ni meditas pri la instruoj de Spiritismo — klopodante purigi nian animon per bonaj intencoj. Tamen, baldaŭ la mondaj tumultoj deturnas nin de nia bela vojo... kaj jen ĝi remalpuriga!

Pri kio temas? Kiujn malpuraĵojn ni devus eviti interne de ni? Kiel konservi nin ĉiam puraj?

Unue, ni konsciu, ke same kiel okazas en nia fizika hejmo, nur ni mem scias, kiu angulo de nia animo bezonas plej rigoran purigon! Ni devas alpreni la konscion pri niaj propraj spiritaj malfortoj, kaj dediĉi fervoran laboron por malpliigi tiun nian mankon. La Spirito Emmanuel, en sia verko “Luma Vitejo”, proponis la ĉapitron “Ni purigu nin” kaj transdonis al ni trafajn, objektivajn vojindikojn. Li skribis:

*“Kiu ne gardas siajn orelojn, tiu eble estos uzata de maljusteco. Kiu ne zorgas pri sia lango, tiu facile povas fariĝi poto da kalumnioj, pro facilanimeco aŭ pro inklino al sensacio. Kiu ne prilumas siajn okulojn, tiu povas fariĝi poto da falsaj juĝoj. Kiu ne orientiĝas per kristana spirito, tiu nature kondukiĝas al multaj sensencaĵoj kaj perturbiĝoj, eĉ se bona intenco instigas lin al laŭdindaj celoj.”*

La aŭtoro ne plilongigas sian liston da “malpuraĵoj”, por ne fari sian belan tekston malagrabla. Krome, ni ĉiuj klare konscias pri tio, kiuj el tiaj malpuraĵoj koncernas nin mem.

Jen tasko por la tuta vivo! Ne nur purigi la koron, sed konservi ĝin pura. Tasko por ĉiutago, por ĉiu momento. Per tia obstinado ni ĉiuj iam “vidos Dion”.

## AVARULO

Promenante en la regiono De Krepuskulo, ĉi en Astralujo, Mi renkontis kelkajn spirithomojn Alvenintajn mia el patrujo.

Inter ili estis komercisto, Kiu elkarniĝis antaŭ jaroj, Sed ankoraŭ ĉiam nur pensadis Pri la mono, gajno, kaj pri varoj.

Kiam mi ekvidis lin, li sidis Ĉe skribotablo, monon kalkulante; Oraj pecoj, papermono kuŝis Tie; li kalkulis ridetante.

Mi salutis. tuj per tuk’ kiu kovris, Tremante, sian montrezoron Kaj ekkriis: “For, aŭ mi la hundon Vokos!” ... Li ekhavis palkoloron.

“Min ne timu”, diris mi; “amiko, Ĉu vi min, Habelon, ne rekonas?” Li respondis: “Ĉu aĉeti volas Vi? Kontante? Mi ne pruntedonas”.

Varojn mi ne vidis, nek murdomon, Ilin havis li nur en l’ imago. Li demandis: “Kial do vi venis? Ne hodiaŭ estas vizittago”.

Vent’ ekblovis kaj la tukon levis Kaj nek mon’ nek oro reaperis Sed nur sablo kaj folioj velkaj. La spirit’ avara ekkoleris:

“Tuj redonu al mi mian monon!” Kriis li, minacis per armilo. Mi ridetis: “Via mon’, amiko, Estas nura ŝajno sen utilo.

Vi ne vivas plu surtere, tial Oro, kupro estas sen valoro Ĉi por vi, sed ĉiam nur valoras Bonaj agoj, bona mens’ kaj koro”.

Tamen, ne komprenis l’ avarulo, Ĉar subite li komencis kuri Ien kie io ŝajnas brili; Kaj mi aŭdis tie lin murmuri:

“Jen mi trovos mian oron tie!” Sed veninte al la lok’ brilanta, Vidis la lampiro kaj malĝojis Ke ne estis ora brilo vanta.

Mi deziris al li priklarigi Lian staton, sed li forkuradis Ne volante aŭdi: retroiris Mi do kaj por li al Di’ preĝadis.

Spirito: Abel Gomes  
Mediumo: Francisco Valdomiro Lorenz  
Kunlaboris: Aymoré Vaz Pinto  
Reformador (FEB), set. 1946, paĝo 220.

**A**NTAŬ NELONGE MI LEGIS la libron de Katalin Kovats, *Stelsemantoj en la ora nordo*. La ĉefa figuro estas Tiberio Morariu, Ĉe-metoda instruisto, kiu atingis grandajn sukcesojn en instruado de Esperanto en la “ora epoko” de nia lingvo, la jardekoj antaŭ la Dua Mondmilito. Sed Morariu ne agis sola, estis multaj sukcesaj instruistoj de nia lingvo en tiu epoko, kaj en kelkaj landoj registaraj instancoj serioze helpis ĝian disvastigon.

Jam la epiteto “la ora epoko” elvokas la malgajan demandon: kio restas el la grandaj triumfoj de tiu tempo? La amara vero estas, ke la “fina venko” ŝajnis tiutempe ne nura iluzio, sed la jarcento, kiu sekvis, atestis la leviĝon de alia “mondlingvo”, la angla, kaj Esperanto estas la amata afero de mikroskope eta parto de la homaro.

Se esperantistoj ne estus ankaŭ esperantoj, ili rezignus kaj serĉus alian hobion. Sed ni persistas en la kredo, aŭ la espero, ke kvankam la nuna “konjunkturo” ne favoras nian lingvon, tio iam ŝanĝiĝos. Ni komprenas la eventualan rolon de Esperanto en kreo de pli bona mondo; ni fidas, ke *iam* la neesperantistoj komprenos.

Mi mem spertis ion similan en mia instrukariero. Dum kelkaj jaroj mi laboris kiel instruisto de Esperanto en la landeto Litovio. Temis pri unumonataj kursoj en diversaj urboj, kaj la nombro da lernantoj ĉie estis agrabla surprizo. Estis ne tre longe post

la sendependiĝo de la lando pro la kolapso de Sovetunio. La rusa estis pli-malpli deviga lingvo dum la soveta periodo, sed ĝi ne estis furore populara. Sed kie ekster Litovio oni povas uzi la litovan? Ĉar ili povis nun vojaĝi eksterlanden, litovoj volis lerni fremdajn lingvojn -- kaj ili aŭdis, ke Esperanto estas la plej facile lernebla idiomo.

Grava faktoro estis la influo de Povilas Jegorovas, la prezidanto de LEA kaj monhava advokato, kiu financis mian instruadon. Povilas iel sukcesis varbi por la kursoj en preskaŭ ĉiu publikigaĵo en la lando, de ĉefaj ĵurnaloj ĝis cirkuleroj por bienistoj aŭ pastroj. Antaŭ ol mi komencis mian unuan kurson en Kaunas, Povilas certigis min, ke minimume 80 homoj partoprenos. Mi ne kredis.

Sed li pravis. Kaj la lernantoj estis el ĉiu aĝgrupo kaj el plej diversaj profesioj aŭ metioj: studentoj, kuracistoj, flegistinoj, policistoj, dommastrinoj, instruistoj, mezlernejoj, bankistoj... Mi instruis en Kaunas multfoje, kaj ĉiam estis minimume pluraj dekoj da homoj en la unua nivelo, poste en dua, tria, eĉ kvara niveloj. Estis kvin lecionoj semajne, po 90 minutoj.

Ĉar mi komence konis neniun vorton de la litova lingvo, mia instruado estis devige nur en Esperanto. Mi ne studis la metodon de Cseh, sed mi kredas, ke mia propra metodo tre similis lian. Mi devis komenci de la plej simplaj diroj, kaj mi devis rigore plani ĉiun lecionon. Multe da aktorado,

amuzaj situacioj, kaj paroligaj taskoj fine de ĉiu leciono.

Kiam mi instruis en la ĉefurbo Vilnius, la nombroj estis eĉ pli kontentigaj. La unuan tagon venis 220, sed mi povis instrui al maksimume 140 en la unua monato. Do 80 konsentis atendi unu monaton.

El la 140 pli ol cent sukcesis en la kursfina ekzameno, kaj la sukcesintoj volis havi duanivelan kurson. La 80 volis nun havi sian unuan kurson -- kaj dume preskaŭ 100 novaj homoj enskribiĝis! Mi instruis de la 10 atm. ĝis 9.30 ptm. kvinfoje semajne. Kaj la rezultoj ĝojigis.

Fine de la unua monato eblis konversacio kun preskaŭ ĉiuj lernintoj. Cetere, mi ja de tempo al tempo skribis gramatikaĵojn sur kretotabulon, sed grandparte la lernantoj kreis sian propran sistemon (nur Esperanto permesus tion!). Kelkaj homoj, kiuj faris la kvaranivelan kurson, iris al la UK en Berlino kaj sukcesis ĉe ekzamenoj tie.

Ho ve! Kio restas hodiaŭ el ĉi ĉio? Oni informis min, ke post mia foriro en 2001 la instruado ĉesis. La Zamenhof-Domo en Kaunas, kie mi loĝis kaj instruis, estis renkontiĝejo por multaj homoj kaj diversaj aktivaĵoj. Laŭ la lasta raporto, kiun mi ricevis, tiu domo nun estas vaka.

Bedaŭrinde tio spegulas la historion de nia lingvomovado. Tiom da progresoj, tiom da perdoj...

Sed iun tagon la semoj trovos fekundan grundon, ĉu ne?



## FINFINE, JEN LA ALMANAKO LORENZ 2023!

Akiru vian ekzempleron!



| KOMUNIKOJ | Jaro 47-a  
| n-ro 191 | Julio-Aŭgusto-Septembro | 2023  
SPIRITISMA ELDONA ASOCIO  
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ  
Fondita la 15-an de Decembro 1975  
Adreso: Rua Aníbal Bruno, 18 - Santa Cruz  
23520-210 - Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)  
+55-21-98427-8080  
Librovendejo: editoralorenz.com.br  
Retadreso: editora\_lorenz@uol.com.br  
Fejsbuko: Editora Lorenz

# Parizo



**D**E LA SUPRO DE L' KAMPANILO mi rigardas la Sejnon kaj la urbon ĉirkaŭan. La subiranta Suno kaj la horizonto, kun sango-ruĝaj makuloj, antaŭsignas stelpunktitan nokto-mantelon.

En obstina deziro sin kaŝi, la luno petolas malantaŭ la nuboj, atendante la momenton kiam ĝi ekregos, post la sundormo.

Mi restas pripensema antaŭ la pentrinda pejzaĝo de la Lumo-Urbo, vojaĝante en dolĉaj konjektoj pri mildiga filozofio.

Ĉiuj konstruaĵoj, monumentoj, pontoj, signifaj lokoj, arkitekturaj belaĵoj, mondfamaj pasejoj, historiaj punktoj de la urbo, de longe plantitaj en tiu regiono, respondas pri la konstanta agado de la homa volo, pri la transformado de vilao en valor-atestilon pri bona arto kaj bongusto.

Rajdaj statuoj, gigantaj ĝardenoj, pompa arkitekturo. Parizo, modelo de beleco kaj arto.

Kiom ajn oni ĉerpos adjektivojn el la intelekto, por difini tiun urban monumenton, tio ne sufiĉos por paligi la brilegon de simpla sunradio.

La roskovrita greso, en matenkrepuska brilego, reflektas la simplecon de la kampara ĉiutageco kaj, por la vidpovaj okuloj, ĝi figuras la bildon de la superega arto, de la dieco kaj belo, disŝutitaj sur tio senmezura kaj tio grandioza, kiel ankaŭ sur tio malgranda kaj tio ordinara.

Kiel jam dirite, la arto troviĝas en la okuloj kaj oreloj de vidantoj kaj aŭdantoj. Por multaj, la verdaj makuloj de arbareto estas sensenca foli-plektaĵo. Por malmultaj, arbareto estigas verdan banon de freŝeco, donante al spirito pacon kaj impreson de ripozo kaj trankvilo.

Multaj sentas ventblovon pasantan tra tubo el ligno aŭ ajna rigida materialo. Aliaj perceptas la velurecan, harmonian sonon de bekluto.

Ni serĉu la belon. Ni esploru la mirindon, kiu ekzistas en ĉio. Ni lasu nin tuŝi de la dia kreitaro. Ni klopodu fariĝi ĉiam pli kaj pli sentemaj por rekoni la "fingron de Dio", kie ajn Ĝi montriĝas.

Kaj post ioma trejnado ni facile atingos admiron, konstatante la neklarigeblan impreson de miregindaĵo.

Magraj vortoj por priskribi tielan "grandiozon".

Atinginte do la komencon, ni akiros tielan spiritstaton, kiu nin kondukos, meze de la ĉiutagaj luktoj, al ia altaĵo kaj al atingo de la proksima evoluŝtupo.

Memoru kaj primeditu la belecon homan kaj dian.

Taksu kaj loku ilin sur adekvatan valorskalon.

Kaj tiel ni sukcese sentos Dion pli proksima al ni.

Dank'al Dio!

Spirito: Francisco

Mediumo: Johano

El la portugala tradukis Affonso Soares.



## Mirindaĵo de la Naturo

### MANGO PALMER

Karaj gelegantoj de **Komunikoj**, se vi havos kuriozaĵojn el via urbo, lando, sendu ilin al ni.

Kunlaboris:  
Maria José (Brazilo)



## LINGVO KIEL PONTO

*Yin Jiaxin (Ĉinio)*

**I**AM, DUM MI ĈEESTIS la ĉinan eksportan foiron en Guangzhou, maljuna komercisto venis kune kun juna virino al mia eksponbudo. La virino en malflua angla lingvo demandis al mi: “Ĉu vi povas paroli la italan lingvon?”

“Ne.” mi respondis en la angla lingvo.

“La francan?” ŝi demandis denove.

“Ne.” mi respondis kun bedaŭro.

Subite, mi ekmemoris, ke fraŭlino Liu de la najbara budo povas paroli la francan lingvon. Mi tuj petis ŝin helpi min.

La maljunulo deziris mendi 2500 T-ĉemizojn de mi. Nia traktado iris jene: La maljunulo diris al la virino en la itala lingvo, la juna virino interpretis al fraŭlino Liu en la franca lingvo, kaj fraŭlino Liu interpretis al mi en la ĉina lingvo. Poste, en la franca lingvo fraŭlino Liu al la juna virino interpretis kion mi diris, la juna virino al la maljunulo interpretis en la itala lingvo. Tial, ni elspezis tutan matenon por la simpla negoco.

Antaŭ ol ni faros la kontrakton, la maljunulo postulis, ke mi presu desegnon sur la T-ĉemizon. Li montris al mi desegnon de verda stelo.

“Ĝi devas esti Esperanta verdstelo, ĉu ne?” mi scivole demandis.

“Jes.” ekbrilis la okuloj de la maljunulo, kaj li esperante demandis al mi: “Ĉu vi scias Esperanton?”

“Jes”, mirigite mi diris en Esperanto: “mi mem estas esperantisto.”

“Mi ankaŭ estas esperantisto.” Li tre ĝojis premi mian manon.

“Ankaŭ mi!” la juna virino diris ekscitite.

Ni tri ekridis laŭte, dum apude fraŭlino Liu tute konfuziĝis.

Lingvo funkcias kiel ponto. Esperanto povas la ponton tuj mallongigi.



**T**AMEN, MALGRAŬ LA sorĉoŝanĝoj estigantaj la neeviteblan marŝon de tiu ĉi vivado, li povus almenaŭ ĝui ian relativan feliĉon. Tamen li serĉas ĝin en la pereemaj kaj submetiĝintaj al la samaj nekonstantecoj, tio estas, al la materiaj plezuroj, anstataŭ serĉi ĝin en la plezuro animaj plezuroj... (“La Evangelio laŭ Spiritismo”)

Feliĉaj homoj estas tiuj, kiuj malkovris plezuregajn agadojn kaj scias ilin valorigi.

Ili estas homoj, kiuj faras, kion ili ŝatas fari, kaj tiu diferencigo igas ilin ĉiam pretaj realigi la taskojn, kiujn ili alprenas.

Ne kritiku nek envidu la feliĉajn homojn. Kiam nin turmentas la aliula feliĉo, tiam ni forgesas serĉadi nian propran feliĉon.

Klopedu trovi tion, kio kreskigas vian personecon kaj investu en ties potencialo.

En la momento, kiam ni ekadmiros tiujn, kiuj estas progresintaj kaj sekvos ilian ekzemplon, tiam ni malfermos la pordojn por atingi nian propran potencialon kaj ekkredi je nia propra realigo-kapablo.

Valorigu tiun, kiu scias vivi sian propran vivon, kaj rajtigu vin mem realigi la plezurojn de via animo.

\* \* \*

El la libro “Transformantaj Ideoj”

De la Spirito: Matheus

Mediumo: Cléber Galhardo

El la portugala tradukis: Benedicto Silva

## CSILLAGOS AZ ÉG...

Csillagos az ég, szép csillagos,  
Rózsafa levele harmatos:  
Könnyemtől harmatos levele,  
Éretted, éretted hulla le!

Csillagos az ég, szép csillagos,  
A szellő fuvalma bánatos:  
A szellő fuvalma sóhajom,  
Éretted, éretted angyalom!

## STELPLENAS ĈIELO STELPLENAS ...

Stelplenas ĉielo stelplenas,  
Rozfolio de roso helas:  
Mia larmo donas la roson,  
Por vi, por vi falas sur rozon.

Stelplenas ĉielo stelplenas,  
Blovo de vento malserenas:  
Blov' de vento mia sopiro,  
Por vi, por vi mia deziro.



*Gyulai Pál*

(Tradukita de Adri Pásztor en 2023)

La biografion de la hungara poeto, vi povas legi ĉi tie: [https://eo.wikipedia.org/wiki/P%C3%A1l\\_Gyulai\\_\(kritikisto\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/P%C3%A1l_Gyulai_(kritikisto))



## Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof

Al s-ro R-r.

Vane Vi timas, ke ni volas enkonduki novan ortografion ("h" anstataŭ signeto superlitera). La fina leĝo por nia ortografio estos: "por unu sono unu litero"; kaj kiam ni nur povos, ni ĉiam uzados «ĉ» anstataŭ "ch" (povas nur esti, ke iom poste, por pli oportunigi la skribadon, ni donos al tiu ĉi litero pli simplan formon). La skribado de unu sono per du literoj estas tute ne logika kaj neniam povus esti aprobata; sed ni ĝin uzas nur kiel necesan unuatempan rimedon por doni al ĉiuj presejoj kaj al la telegrafo la eblon labori jam nun en nia lingvo. Sed kiam iom post iom la plej granda parto de la presejoj kaj telegrafejoj proviziĝos je nia alfabeto, tiam la uzado de superflua "h" estos absolute ĉesigita. Ne la "ĉ" estas transira ŝtupo al "ch", sed en la "ch" ni

proponis transiran ŝtupon al "ĉ", kiam ni vidis, ke la absoluta enkonduko de "ĉ" estas ankoraŭ teĥnike ne oportuna. Tute vere Vi diras, ke la presejoj kaj telegrafoj devas sin konformigi je la lingvo, kiun ili uzas, kaj ne la lingvo je ili; sed nia lingvo estas ankoraŭ juna kaj nepotenca kaj devas sin fleksi, se ĝi ne volas pereii. Ne estas ankoraŭ tempo diri fiere al ĉiuj presistoj: "se vi ne volas vin konformigi je ni, ni vin ne bezonas!" La unuatempa permeso presi per "h" estas necesa rimedo por ne fari ofte la presadon de ia verko tute ne ebla aŭ tro multekosta; sed kiu nur havas la eblon presi per signetoj superliteraj, tiu ĉiam devas ĝin fari.

Zamenhof

Libro: **Unua etapo de Esperanto – 1878 – 1895**  
Eldonejo Ludovikito, 1989.

## NOVA SIDEJO LORENZ

Finfine, post 47 jaroj, Eldonejo Lorenz akiras sian propran sidejon. Sen ia dubo, jen motivo por festi, sed ankaŭ fervore labori! Se vi volos partopreni ĉi gravan momenton de nia E-Movado, skribu al ni! Ni kalkulas je ĉiuj bonvolemaj koroj. Kiu volos kunlabori, skribu al ni: [eldonejo\\_lorenz@uol.com.br](mailto:eldonejo_lorenz@uol.com.br)  
**+55 21 98427-8080**


## JEN GRAVA SCIIGO!

TREVOR STEELE, nia kara aŭstralia samideano, tradukis el la esperanta versio, fare de Affonso Soares, la libron "Kazo de reenkarne", de Yvonne do Amaral Pereira. Dume, la eldono estas nur en la angla bitigita versio (e-book). Se vi ankaŭ kapablas fari la samon en aliaj lingvoj, skribu al ni. La verko havas 92 paĝojn. [editora\\_lorenz@uol.com](mailto:editora_lorenz@uol.com)



AGORA VOCÊ PODE ADQUIRIR EM NOSSA LOJA  
VÁRIOS TÍTULOS DA FEB E DE OUTRAS EDITORAS

www.  
editora  
lorenz  
.com.br



FAÇA-NOS UMA VISITA!

LORENZ

# PSALMO



*Antônio Pereira de Souza Caldas*  
Brazilo

Feliĉa estas kiu ne aŭskultas  
malicajn konsilojn,  
Neniam iras sur la voj' maljusta  
De la pekul' malglora,  
Sin ne apogas kun fier', sur seĝo  
Pestita per malvirto,  
Sed de l' Sinjor' la leĝon observante,  
Ĝin studas kaj meditas  
Dum hela tago, dum malluma nokto.  
Feliĉ' kaj malfeliĉo,  
Al li ja ŝajnas ke muldiĝas ĉio.  
Similas li arbeton  
Plantitan sur la bordo de rivero,  
Kiu per verdfolioj  
Ornamas baldaŭ la levitan frunton  
Kaj, en sezon' favora,  
La branĉojn klinas, plenajn jam de fruktoj.  
Ne tiel malpiuloj,  
Sed kiel polvo, kiun vento blovas,  
En l' aerspaco levas,  
Mallevas, ŝutas kun koler', dispelas.  
Atendas ilin tial  
La tag' de venĝo, kaj malvarma sango  
Per tim' plenigos ilin.  
Per gloro vesti sin ne povas ili  
Nek juĝi kun justuloj.  
La virton la Sinjor' apogas firme,  
Dum malpiulo kuras,  
Batite per ventegoj terursonaj,  
Ŝipdroni sen gvidilo.

Brazila Antologio Poezio (Eldonejo Lorenz)  
Tradukis el la portugala:  
Francisco Valdomiro Lorenz

**Antônio Pereira de Sousa CALDAS** [Antonjo Perejra de Soŭza Kaŭdas] (naskiĝis la 24-an de novembro 1762 en Rio-de-Janeiro, mortis la 2-an de marto 1814 en Rio-de-Janeiro), estis poeto kaj pastro. Estas patrono de la 34-a seĝo de Brazila Beletristika Akademio.

# ANTAŬ LA HEJMO

**L**A HEJMO ESTAS la centro de niaj agadoj en la mondo. Efektive la Tero estas nia domo en la vivo kaj la Homaro estas nia vera familia grupo. Tamen, en la hejma mikrokosmo, vi havas la lecionon kaj la benon, la lernejon kaj la kuracejon.

Jen kial, inter kvar muroj de la tera domo, ni trovas, dum la fizika ekzistado, la plej obskurajn problemojn. Tie interne, en malvasta spaco de kelkaj metroj, ni konas la sturmon de ĵaluzo, la frapon de klaĉoj, la galon de miskompreno, la tenebron de kalumnio, la vinagron de kritikado, la malvarmecon de indiferenteco kaj la doloron de laceco, rikoltante, multfoje, ŝtonojn kaj dornojn el karaj manoj, kiujn ni dezirus kisadi konstante per nesuperebla korinklino.



## SUR LA VOJOJ DE LA VIVO

*Carlos de Abreu*

Sur la vojoj de la vivo  
Mi senhalte iradas,  
Kun la celo eltrovi  
Solvejojn por la problemoj,  
Kiuj trafas la personojn  
Kaj ilin igas suferi.

Mi pensas, ke iu rideto,  
Iu brakumo  
Estus la solvo.

Sed malbonvolon mi renkontas,  
Kaj, rigardante al la ĉielo,  
Inspiron mi serĉadas.

Mi poste rigardas al la maro,  
Kaj sur ties ondoj  
Mi komencas vojaĝon.

Mi alvenas al loko  
De senkompara beleco.  
Kaj mi vidas, ke la personoj  
Havas brilan rigardon  
Kaj vizaĝesprimon  
Kiuj ravas la koron.  
Tio estas la loko,  
En kiu mi bezonas resti,  
Por lerni  
Kiel pliboniĝi,  
Por ke iam  
Helpi mi ankaŭ povu.

El la portugala tradukis:  
Affonso Soares

En la malvasta rondo de la samsangeco, aperas al animo la plej afliktaj sugestoj de malvenko kaj la plej fortaj alvokoj al senkuraĝeco. Tamen ankaŭ estas tie, en la privateco de tia spaco de plejpuriganta lukto, ke ni surprizas benatajn ŝancojn de elpurigado kaj progreso.

Ensborbante la maltrankviligan etoson, samkiel malpura metalo en la renoviga krisolo, nia spirito, ricevante la lesivon de ŝvito kaj larmoj, atingas esprimplenan ŝtupojn de revigliĝo, antaŭenirante al Plej Granda Vivo.

Ne ignoru la malfacilaĵojn kaj la krizojn kiuj eble faras el via domo elpurigan templon.

Uzu humilecon kaj paciencon, bonecon kaj toleremon en via ĉiutaga konduto, laborante kaj amante, lernante kaj servante kaj via hejmo, hodiaŭa turmentejo, morgaŭ estos por vi altvalora bazo, de kie vi povos startigi plej noblajn flugojn de paco kaj sublimigo al la Granda Venko.

Aŭtoro: Emmanuel (Spirito)

Mediumo: F. C. Xavier

El la libro: "Atenção"

IDE – Instituto de Difusão Espírita Editora

El la portugala tradukis: Johano








**BAES**  
Brazila Asocio de Esperanto-Spiritistoj

**E**SPERANTO-SPIRITISTOJ EN BRAZILIO fake kunvenas, renkontiĝas aŭ kongresas jam de jardekoj, sed la unuan fojon en laŭnome tutlanda evento nur en 2006, antaŭ la fondo de Brazila Asocio de Esperanto-Spiritistoj (BAES) mem, kiu ekde 2008 respondecas pri la t.n. Brazila Renkontiĝo de Esperanto-Spiritistoj (BRES). Post du jaroj da virtualaj eventoj, BRES povis denove okazi fizike la 22an kaj 23an de aprilo. Ĉi-foje en la urbo Uberlândia, kiu cetere gastigis la duan eldonon de la renkontiĝo, en 2007. El la 24 aliĝintoj, partoprenis 14 el ses brazilaj ŝtatoj. Dum la evento okazis Esperanto-kurso por komencantoj, al kiu aliĝis 32 personoj, partoprenis 20. Gvidis la kurson Cícero Gabriel, sperta Esperantisto, redaktoro de Brazila Esperantisto, organo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL). Néia Lúcia, respondeca persono ĉe Biblioteko Carlos Domingues, la biblioteko de la Ligo, en Braziljo, aranĝis sukcesan brokantan libroservon kun multe da valoraj presaĵoj. Ĉio disvendiĝis, kaj la sumon trafos en la bibliotekan kason. Malbrokantan vendadon de libroj kaj esperantaĵoj aranĝis la organiza teamo de la evento. Libroj el la Eldonejo Lorenz konsistigis la stokon.

La programo de la evento inkluzivis ekspozicion de historiaj eroj el la Esperanto-spiritisma movado, ekskurso al la iama loĝdomo de la fama medio Chico Xavier, en la najbara urbo Uberaba, fruktodona diskuto pri terminologio kaj praktika agado kadre de la librokampanjo Abel Gomes. La partoprenintoj kunlaboris je la pretigo de dekoj da librokompletoj, kiujn BAES donacas al unuopuloj kaj al bibliotekoj de spiritistaj societoj.

La Kampanjo, fondita en 2021, celas provizi precipe la bibliotekojn de spiritistaj societoj per spiritisma literaturo en esperanto, originala kaj tradukita, kaj per lernolibroj de la Internacia Lingvo. En la septembra numero de la organo de la Asocio aperos detala raporto de la 13a BRES. En 2024 ĝi okazos ne fizike, sed virtuale, en aprilo. La fizikaj eventoj okazos ĉiun duan jaron. En 2024, plej verŝajne, BAES estos plu ne brazila, sed transnacia organizaĵo. Ĝi fariĝos simple Spiritisma Esperanto-Asocio, laŭ la propono de la nuna estraro kaj la ĝis nun unuanima konsento de la membraro.



## ALMANAKO LORENZ 2024

Artikolistoĵ de Almanako Lorenz 2024, ne forgesu ke la limdato por liveri viajn tekstojn estas 31/12/2023.

“Vivu, kresku kaj floru la verda standardo”.



**LORENZ**

**J**am estas tempo por aliĝi aŭ reaniĝi al nia Asocio por la nova jaro. Per la aliĝo la ano ricevos nian jarlibron, la **ALMANAKO LORENZ**, la trimonatan bultenon **KOMUNIKOJ** kaj ankaŭ rajtas elekti du librojn el nia katalogo, kaj rabaton de 30% ĉe la aĉeto de niaj libroj. Petu tuj vian aliĝilon: [editora\\_lorenz@uol.com.br](mailto:editora_lorenz@uol.com.br)



**+55 21 98427-8080**

**KOMUNIKOJ** N-ro 191